

# LINGVA KRITIKO

## STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Prof. D-ro Ing-ro R. Orenge. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114)

VOLUMO I \* N-RO 4

MAJO 1932

### Survoje al Konsilanta Gramatiko.

Redaktanto: Teo Jung.

La artikolo en „Lingva Kritiko“ n-ro 2 kun la aldonitaj demandoj kaj respondoj vekis en nia legantaro neordinaran eĉon. Alvenis amasego da materialo — unu sola samideano sendis por ĉi tiu rubriko 26 diversajn erojn. Tioma intereso por la lingvaj demandoj certe ĝojigas nin; aliflanke estas tute neeble publikigi ĉion. Cetere tio ja ne estas la tasko de nia rubriko. Multaj skribintoj nur ripetis aŭ variigis tion, kio jam estis dirita en niaj „respondoj“. Aliaj bagateleme kritikis, kio ne havas valoron por la plenumo de nia tasko, aŭ obstinas pri erara opinio. Ree aliaj sendis ampleksajn artikolojn ĉu kompletigajn ĉu klarigantajn diferencan vidpunkton. El ili ni povas ĝenerale nur ekstrakti la ĉefajn ideojn, se ili estas valoraj kaj pravaj. Kelkajn speciale taŭgajn artikolojn ni publikigos aparte, kiam la loko permesos.

Por eviti konfuzon de niaj respondoj kun la „Lingvaj Respondoj“ de D-ro Zamenhof, ni nomos la niajn de nun „gramatikaj“ demandoj kaj respondoj.

Bonvolu korekti en „Lingva Kritiko“ n-ro 2, 8-a demando: „komisio“ anstataŭ „komisiono“; en la 1-a respondo: „sen dependeco“ anstataŭ „sen sendependeco“. En la 10-a respondo, post la vorto „senco“, mankas parentezo.

Materialon destinitan por la „Konsilanta Gramatiko“ oni direktu al s-ro Teo Jung, Brüsseler Str. 94, Köln, Germanujo; ĉiun ceteran materialon por „Lingva Kritiko“ al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo.

#### Gramatikaj demandoj.

##### 13. Komparativo sen komparo.

Mi legis jenan frazon: „Neniu pli grava gazeto preparolis ĝin.“ Ĉar antaŭe oni parolas pri neniu gazeto, mi ne ĝin bone komprenas.

##### 14. Neceso kaj sufiĉo.

Oni ofte legas „intereso“ (anstataŭ: interesiĝo), „organizo“ (anstataŭ: organizaĵo) kaj sim. Ĉu korekte?

(Laŭ demandoj de A. Z.)

##### 15. Direkta -n.

Ĉu la jena frazo estas korekta: „Mi iras ĉe mian amikon“? (L. C. en A.)

##### 16. Sekso.

En artikolo de s-ro Waringhien en L. Kr. n-ro 3 oni trovas la formon „infano — ĵ“: Ĉu ĝi estas korekta? (K.)

##### 17. Post ol?

En la sama artikolo (vidu demandon 16)

mi trovis la formon „post ol“, kiun mi neniam renkontis ĝis nun. (K.)

##### 18. Participo.

En la artikolo „Lingvistiko kaj internacia lingvo“ (L. Kr. n-ro 3) troviĝas la jena frazo: „same kiel la vorttrezoro . . . povas esti utile kreata nur prenante la komunajn elementojn . . .“ La participo „prenante“ ŝajnas al mi nekorekta. (M. W.)

##### 19. Tempoformo (imperativo).

„La paŝtisto zorgas tiel ke ŝiaj ŝafoj ne pereos (pereus, pereu).“ — „Atentu ke vi ne pereos (-us, -u)!“ — „Mi timas ke li venos (-us, -u).“ — Ĉu en la nomitaj propozicioj oni devas uzi la formon estontan, konjunktivan aŭ imperativon? (J.D., A.)

\*

En de germanoj skribitaj artikoloj ni plurfoje trovas laŭgermanan imperativan formon kun postmetita anstataŭ antaŭmetita pronomo, ekzemple „iru ni“, anstataŭ „ni iru“. Al germano tia esprimmaniero ŝajnas esti tute natura, ĉar li laŭ la postuloj de sia gepatra lingvo parolas tiamaniere, sed al negermano ĝi ŝajnas iom stranga. Regulojn pri formado de imperativo trovas germano en la Fundamenta (Grammatik. Formen des Zeitwortes) p. 14 d) „Der Imperativ auf -u; z.B. faru, mache, macht; ni faru, lasset uns machen.“ — Ekzemplo en Ekzerco § 20, p. 49: „Ni estu gajaj, ni uzu bone la vivon, ĉar la vivo ne estas lenga.“ (F. Št.)

#### Respondoj.

##### 1. Malarmado.

S-ro A. Z. prave opinias ke la plej klara vorto estus **malarmigado**, ĉar la ŝtatoj volas (aŭ ne volas) malarmigi. Sed laŭ la principo de sufiĉo sufiĉas **malarmado**.

##### 2. kaj 3. Movi, movigi; de antaŭ, de post.

Alvenis du klarigoj, sed pli malpli ripetantaj nian propran respondon. Ankaŭ tion ni jam diris, ke la netransitiva uzado de transitivaj verboj senobjektaj ne estas rekomendinda, kvankam per la principo de sufiĉo oni povas eventuale pravigi ĝin.

##### 4. Refleksivo.

Tri skribintoj opinias ke estas indiferece, kie staras „pri si“. Verdire, en la citita frazo duobla senco ne estas timenda. Sed se vi ŝanĝos la verboformon „paroligis“ je „igis paroli“ aŭ je dependa propozicio, vi rimarkos la dusencecon: „Tiuj tri kuraĝaj viroj faris la unuajn flugojn kaj igis la tutan homaron paroli (igis, ke la tuta homaro parolu) pri — si (?).“ Ĉiukaze la frazo estas pli klara post la lokŝanĝo de „pri si“.

##### 5. Singularo — pluralo.

S-ro G. J. D. ne konsentas al nia respondo. Certe, severa logiko postulus post „duono“ la singularon; tamen ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en naciaj lingvoj oni rajtas rilatigi la adjektivon ne nur al „duono“ sed ankaŭ al ĝia komplemento. Kompreneble oni povus sin esprimi ankaŭ alimaniere, kiel s-ro D. skribas: Duono de ĉiu paĝo estu surprisita; ĉiu paĝo estu duone surprisita; la paĝoj estu duone surprisita, ktp.

##### 6. Interpunkcio.

Alvenis unu konsento kaj unu duona konsento al nia respondo. Pri la interpunkcio en Esperanto certe ankoraŭ multo estas dirota en tiu ĉi-rubriko.

##### 7. Antaŭ ol — antaŭ kiam.

Alvenis kelkaj aproboj al nia respondo, inter ili bona artikolo de s-ro G. J. D., kiun ni publikigos aparte, se la loko permesos.

##### 8. kaj 9. Tempoformoj.

Ni ricevis kelkajn respondojn ankoraŭ prilaborotajn. Detala artikolo pri **ata-ita** aperos post nelonge aŭ en L. Kr. aŭ sur la propraj paĝoj de Heroldo.

##### 10. Participo.

Ni petas relegi nian respondon, kiun multaj legantoj evidente miskomprenis. — S-ro A. Z. opinias: „La frazo similas al latina »ablativus absolutus«, do pli facile komprenebla al sciopovantaj latinon . . . Ne postulas ies permeson.“ — S-ro F. Št. atentigas nin pri la Lingva Respondo n-ro 19 de D-ro Zamenhof „pri ablativo absoluta“. Ni represas: „Kvankam ĝi nenie estis rekte malpermesita, tamen ĝia uzado estas kontraŭ la spirito de nia lingvo.“ — Tion opiniis D-ro Zamenhof, sed tiun kontraŭecon kontraŭ la spirito de nia lingvo ni ne sentas, nek sentas ĝin multaj aliaj. (Vidu ankaŭ demandon n-ro 18 kaj nian respondon!)

##### 11. Akuzativo.

S-ro A. Z. opinias ke „S-ron“ estas ne-logika, ĉar li (la sinjoro) ne prezentas iun lokon.

##### 12. Se — ĉu.

S-ro J. W. atentigas nin ke en ambaŭ frazoj oni povas apliki ankaŭ „kiam“. Li estas prava. Kompreneble ŝanĝiĝas per tio la senco de la frazoj.

##### 13. Komparativo sen komparo.

La komparativoj sen komparo estas germanismo, kiun ni konsilas eviti. En germana lingvo *eine wichtigere Zeitschrift*, t. e. laŭvorte unu pli grava gazeto, senplue signifas: sufiĉe grava, iom grava, graveta gazeto, gazeto grava kompare kun la aliaj. Kvankam ankaŭ en latina lingvo similaj formoj ekzistas (*senectus est loquacior*), ili estas nekonataj en la ĉefaj modernaj lingvoj, krom, kiel dirite, en la germana, kaj ne

sufiĉe logikaj por permesi tujan komprenblecon al la nekutimantoj.

En Ekzercaro (32,4) ni legas: **Multaj birdoj flugas en la aŭtuno en pli varmajn landojn.** Tie ĉi ni ne havas komparativon sen komparo; nur preterlasos de tuj komprenbla komplemento: en landojn pli varmajn (ol tiuj, en kiuj ili estis). (B. M.)

#### 14. Neceso kaj sufiĉo.

Laŭ la principo de sufiĉo, la nomitaj formoj estas korektaj, en kazoj kiam miskompreno ne estas timebla. La kunteksto kaj la lingva sento de la uzanto de la lingvo decidas pri tio. Esperanto ja estas lingvo sed ne matematiko; ĝi estas logika sed ne „hiperlogikoza“.

#### 15. Direkta -n.

Ni opinias la cititan frazon ne malkorrekta, sed ankaŭ ne rekomendinda. Prefere estas diri: „Mi iras al mia amiko.“

#### 16. Sekso.

Infano, kies sekso ne estas konata, estas karakterizata per la pronomo „ĝi“. Tamen, oni diras preskaŭ ĉiam ankaŭ: „homo — ĝi“, ankaŭ en tiuj kazoj kiam la sekso estas duba.

#### 17. Post ol?

Ni ne aprobas tiun formon. Sed ĝi estas analoga al la ĝenerale uzata „antaŭ ol“. Oni devus diri „antaŭe ol“ kaj „poste ol“. Ni rekomendas uzi **antaŭ kiam** kaj **post kiam**, kiuj sendube estas korektaj.

#### 18. Participo.

Vidu nian respondon al la 10-a demando!

## Alp(in)isma Terminaro.

Kunmetis H. Sirk, Profesoro de fiziko en la universitato Ljubljana (Jugoslavujo).

Turisto, kiu faras ascendojn kaj ekskursojn en montaro, ekz. en Pireneoj, en Kaŭkazo aŭ en la Alpoj, nomiĝas **alp(in)isto**. Se li ne iras sur konstruita vojo, li devas sciopovi **grimpi** kaj havi nenian inklinon al **vertigo**.

#### Ekipo.

La alp(in)isto devas havi sur si **taŭgan ekipon**. La ŝuoj devas esti **najlitaj**, por ke li ne glitu sur kruta vojo. Plej ofte li surmetas mallongajn, ĝisgenuajn, pantalonojn, **\*kulotojn**, kaj ŝirmas la gambojn per ŝtrumpoj, kiuj devas esti el lana pro la malvarmo de la altaĵo. Pli konsilinde estas surmeti **duonŝtrumpojn** kaj ŝirmi la gambon per **\*gambosŝtrumpoj**, kiujn oni ne devas tiel ofte ŝanĝi kiel la duonŝtrumpojn. Anstataŭ ĉapelo la alp(in)isto preferas ĉapon. En la dorsosako la alp(in)isto portas akvodetenan mantelon, mallongan, sen manikoj, por esti ŝirmata kontraŭ pluvo, nomatan **pelerino**, tolaĵon, **mangoprovizon** kun akvo en aluminia botelo kaj diversajn gvidilojn, (geografian kartojn kaj gvidlibrojn). Se li intencas iri sur glaciejoj kaj glaciigitaj neĝejoj, li kunprenas **kramponojn**, kiujn li ligas per rimenoj al la ŝuoj. Tiukaze necesas havi **glacihakilon** por haki **ŝtupojn** en la glacio kaj havi ĉe la **\*traversado** de glaciaj deklivoj flankan **apogon**. Por malfacilaj grimpadoj la alp(in)isto bezonas ŝuojn el tolo kun plando el tuko aŭ alia fleksebla materialo, por ne gliti sur la roko: la **grimposuojn**. Se pluraj alp(in)istoj entreprenas malfacilan **grimpadon**, ili devas kunporti sufiĉe fortan **ŝnuron** longan ĝis 30 m por **sekurigi** unu la alian. Oni portas la ŝnuron aŭ **volvitan** en la dorsosako aŭ en grandaj **volvaĵoj** trans la maldekstra ŝultro. Ĉe tre

#### 19. Tempoformo (imperativo).

Imperativo staras, kiam oni volas esprimi ke io okazu aŭ ne okazu, do ĉe esprimoj de ordono, volo, peto, deziro, celo ktp., en dependaj propozicioj plej ofte post **por ke**, **por tio ke**.

1. En la unua frazo devas stari **-os**: La paŝtisto zorgas **tiel ke** liaj (siaj estas eraro) ŝafoj ne pereos. — **Tiel ke** indikas manieron, sed ne celon. Sen „**tiel**“ devus stari imperativo: La paŝtisto zorgas (por tio) ke liaj ŝafoj ne pereu; ĉar (por tio) ke indikas celon, intencan, ke io ne okazu.

2. En la dua frazo devas stari **-u**: Atentu (por) ke vi ne pereu; ĉar (por) ke indikas celon.

3.—4. En la tria kaj kvara frazoj povas stari **-os** aŭ **-u**, en la kvara ankaŭ **-us**, laŭ la ĉelata senco:

Timu ke vi pereos!

Timu (ke la rabistoj decidis) ke vi pereu!

Mi timas ke li venos.

Mi timas (ke oni ordonis [aŭ: -os] al li) ke li venu.

Mi timas ke li venos (se li havus tempon).

Cetero, en Esperanto ne ekzistas konjunktivo (subjunctif); -us ne estas konjunktivo, sed kondiĉa modo (kondicionalo).

\*

Koncerne la opinion de s-ro F. Št.: **Regula** postmetado de la pronomo post la imperativo estas nebona, „plurfoja“ postmetado ne malutilas, sed povas eventuale esti pli vivan stilon aŭ specialan retorikan efikon. Certe, „ni uzu Esperantan Esperanton“, kiel skribas s-ro Št.; sed ŝajne li vidas germanismon en tio, kio estas nur vivigita stilo kaj, certe, bona Esperanto.

malfacilaj grimpadoj oni kunprenas ferajn **rokhokojn**, kiujn oni enirigas per **grimpmartelo** en la rokon.

#### La grimpado.

La partoprenantoj de **grimpekskurso** alŝnurigas sin ĉe la **ekgrimpejo**. Tie oni **deponas** aĵojn, kiujn oni ne bezonas ĉe la grimpado ekz. dorsosakon, eventuale najlitajn ŝuojn ktp., se oni revenos per la sama vojo. Sed se oni intencas **malascendi** per alia vojo, se oni **\*transiras** la monton, oni devas preni sian tutan ekipon kun si, kaj la grimpado farigas tiel pli malfacila kaj malpli ĝua. Je malfacila, ne sekurigita, **ekspozita** vojo la grimpado postulas grandan singardon. Oni devas serĉi firman tenilon en formo de malgranda **elstarajo** el la roko aŭ en formo de fendeto sufiĉe granda por enmeti almenaŭ kelkajn fingrojn. Pro la subita rompo de ne sufiĉe forta tenilo okazis jam multaj mortigaj **\*falegoj**. Alia danĝero ĉe la grimpado estas ŝtonoj falantaj aŭ per si mem aŭ deĵetataj de nesingardaj grimpantoj aŭ de ĉamoj. Tiu **ŝtondanĝero** estas plej granda en **kamenoj** kaj **krutaj gorĝoj**, kiujn oni povus ankaŭ nomi **sekaj fluejoj**. Por plia sekureco la grimpanto serĉas vojon supren tra montfendoj nomitaj **kamenoj**, ĉar la grimpado tra ili similas al la grimpado tra la interno de kamentubo. Ofte la kamenoj estas **superpendantaj** kaj tial malfacilegaj. Por eviti tian **superpendaĵon**, oni ofte devas **elgrimpi** en la muron, kie oni trovas pli facilan, kvankam eksponitan grimpadon: Je la muro oni ofte grimpas horizontale, oni rampas laŭ pli aŭ malpli larĝaj **strioj**.

Ĉe la grimpado la **kunulo sekurigas** unu la alian per la **ŝnuro**. Ĉe la ascendo estas

ja unua (**gvidajo**) la plej bona grimpanto, kiu povas esti sekurigita nur malbone de malsupre. Ĉe la **sekurigado** de kunulo la grimpanto uzas **elstarajojn** el la roko, se eble **blokon**, preter kiu li glitigas la ŝnuron, tiel ke en okazo de falego la froto kunhelpu al la **bremsado** kaj haltigo de la falo de la kamurado. Se la dorsosako tro malfaciligas la grimpadon, oni **surŝnurumas** ĝin, tiel la **antaŭgrimpanto** grimpas alŝnurigita sen sako. Atinginte **starejon** li altiras la ŝnuron, je kiu la kunulo fiksas la sakon, malfiksas ĝin kaj sekurigas la **algrimpantan** kunulon. Ĉe la **malascendo** la plej bona grimpanto estas la lasta. Ĉe tro grandaj malfacilaĵoj li sekurigas sin mem de supre per la ŝnuro, li **deŝnurumas** sin. Por tio li enmetas la mezon de la ŝnuro en antaŭe fiksitajn rokhokojn, prenas la ambaŭ partojn de la ŝnuro en la manon kaj malascendas turnita al la monto serĉante **apogon** por la piedoj. Tra eventuala superpendaĵo li devas **libere deŝnurumi** ĉirkaŭante per la piedoj la ambaŭ ŝnurpartojn. Tiun teknikon devas ankaŭ apliki **soliranto** ĉe la malascendo. Fininte la grimpadon la **kunŝnuruloj** elŝnurigas sin. La **ŝnurtekniko**, pri kiu mi ĵus parolis, estas la plej grava parto de la **roktekniko**. Por ekskursoj en **glacimontoj** oni bezonas la **glaciteknikon**, kiu ebligas la sendanĝeran marŝadon sur **glaciejoj**, la ascendojn de glaciaj deklivoj, eviton de la lavangodanĝero ktp.

#### Markado de vojoj.

En la Alpoj multaj piedvojoj estas signitaj per koloraj **markoj** sur ŝtonoj, arboj ktp. tiel, ke ankaŭ fremdulo povas trovi la vojon. De bone markita vojo oni postulas, ke ĝi estu trovebla ankaŭ en nebulo. Tial oni enmetas en montherbejojn, kie ne troviĝas taŭgaj ŝtonoj, bastonetojn kun markoj. Ĉe la komenco de markita vojo devas stari **vojontrilo**, kiu indikas la celon kaj ankaŭ la daŭron de la vojo, kiu kompreneble varias laŭ la **marŝrapido**. Pri la **markado** de la vojoj zorgas ĝenerale la **alp(in)aj** societoj, kies plej spertaj membroj laboras kiel **markantoj**. Ili ankaŭ zorgas pri la rebonigo de la **markaroj**, pri la **remarkado**. Ĉe malfacila grimpado precipe la soliranto devas zorgi ke li povu (eble ĉe deviga **returnado**) retrovi de li trovitan ne markitan vojon. Tial, oni deponas **markadpaperon**, prefere ruĝkoloran, kiun oni fiksigas per ŝtonetoj. Kelkfoje oni konstruas por **markado ŝtonpiramidetojn**.

#### Sekurigado de vojoj.

Vojoj, kiuj ebligas ascendon al alp(in)e grava pinto kaj prezentus tro grandajn malfacilecojn al alp(in)istoj ne sufiĉe spertaj en **grimparto**, estas ofte sekurigataj. Kiel sekurigilojn oni uzas **dratŝnurojn** fiksitajn en la rokojn per feraj **fiksiloj**, kaj ferajn **stiftojn**. Pli oportunaj por la piedoj estas ambaŭflanke en la rokon fiksitaj feraj **krampoj**.

#### Kabanoj.

Krom la zorgado pri la vojoj estas la plej grava tasko de alp(in)aj societoj la konstruado kaj administrado de **turistaj kabanoj**. Plejmulte la kabanoj estas **mastrumataj** dum la someraj monatoj, kelkaj dum la tuta jaro. En la **nemastrumataj** kabanoj oni nur **trankvitas** kaj serĉas ŝirmon kontraŭ malbona vetero. La membroj de alp(in)aj societoj ĝuas rabaton en siaj kabanoj kaj en tiuj de amikaj societoj.

#### La ascendoj.

al montsupro devas esti bone elektita. Ofte oni ascendas tra **montgorĝo**, se ĝi ne estas tro **ŝtondanĝera**, al **breĉo**, malgranda roka montpasejo en la **montkresto**, kaj poste laŭ la kresto al la supro.

# Dokumentoj pri L.I.\*)

## Por kaj kontraŭ.

... la artajn lingvojn mi diversajn fojojn dum dudek jaroj defendis, ne pro praktika intereso, sed pro lingvoscienco, kaj ĝuste kontraŭ reprezentantoj de la lingvoscienco mem, kontraŭ homoj kiel Diels, Brugmann, Leskien.

Jen la demando: ĉu ekzistas fundamenta diferenco inter tiuj ĉi lingvoj kaj la ceteraj aliaj, pro ilia arta konstruo? Tion ĉi mi neis. Mi ne komprenas, kial nova lingvo ne povas esti kreata el laŭvola ŝtofo, en laŭvola maniero, kaj fiksata en malmultaj generacioj. La kreataj lingvoj liveras pri tio ĉi bonan paralelon...

H. Schuchardt: „Der Individualismus in der Sprachforschung“ (La individualismo en la lingvistiko): Sitzungsber. Akad. der Wiss. Wien, 204 (1925), 2, p. 15.

## Ĉu Esperanto disialos en dialektojn?

... Ni rimarku, ke helpa lingvo komplete elpensita, kiel Esperanto aŭ Ido, estas en la samaj kondiĉoj de funkciado kiel Latino, mortinta lingvo (uzita dum Mezepoko, dum Renesanco, de la Eklezio kiel helpa lingvo); oni pretendis, ke tiu speciaj kreaĵoj estas ne-daŭraj, ĉar artefarita lingvo, enkondukita en la uzadon, estus entirata en la saman nehaltigeblan evoluon kiel la naturaj lingvoj kaj frakciigus en dialektojn; la ekzemplo de latina lingvo ŝajnas pruvi la kontraŭon...

Ch. Bailly: „Le langage et la vie“, 2-a eld., Paris 1926, p. 201.

## Simpligo de modernaj lingvoj, simpleco de artefaritaj.

... Ni ne forgesu, ke la rezultato, al kiu direktigas la modernaj lingvoj (pli simpla kaj klara strukturo), estas ĝuste tiu, kiun parte atingis la artefaritaj lingvoj, komplete elpensitaj... id., ib., p. 210.

\*) Kolektitaj kaj tradukitaj de B.M.

## Naciaĵoj kaj neologismoj.

1. Koncerne la certe necesan batalon kontraŭ naciismoj, ĉar grava flanko de ĝi estas la distingo inter naciaĵo kaj internaciaĵo, mi rememorigas, ke antaŭ pli ol dek jaroj, en la jaro 1921, la Direktoro de la Akademia Sekcio por la Komuna Vortaro iniciatis esploron pri la nacilingvaj proverboj, komparoj kaj bildaj (metaforaj) esprimoj, celante kolektadon de esprimoj, kiuj estas jam internacie uzataj aŭ estas internacie, almenaŭ sufiĉe ĝenerale, kompreneblaj, kaj la forpuŝadon de la neasimileblaj naciaĵoj. Komence mi ricevis sufiĉe multajn leterojn kaj demandojn, al kiuj mi zorgigis kaj detale respondis, tiel, ke ĉirkaŭe kvindek samideanoj promesis sian kunlaboradon; sed, depost 1924, mi nenion plu aŭdis pri la projektita esploro, kredeble simple pro tio, ke tiu esploro trudis al la kunlaborantoj iom altajn elspezojn. Mi do daŭrigis sola la laboron kaj feliĉe povis utiligi miajn studojn ĉe la verkado de la „Plena Vortaro“.

2. Koncerne la evoluon de Esperanto la demando ne estas, ĉu Esperanto evoluas, ĉar tion sufiĉe pruvas la faktoj, sed ĉu ĝi evoluas tiel, kiel ĝi devas evolui. Ĉar la pre-

cipa parto de la evoluo konsistas en la enkonduko de neologismoj, mi parolos nur pri tiu flanko de la afero: ŝajnas, ke la tempo venis, kiam ni nepre devas aŭskulti la protestojn de la propagandistoj kaj malrapidigi la tro rapidan kreskadon kaj ŝveligon de nia vortaro, en kiu kuŝas efektiva danĝero, kiun oni ne sukcesos forigi, simple alinomante la plidikiigon pliriĉiĝo. Tamen ni devas samtempe kontentigi la postulojn de la literaturistoj kaj poetoj, kiuj per siaj verkoj plej efike pruvas la vivantecon de Esperanto. Tiu, kiu kapablas trovi rimedon por faciligi la taskon de la propagandistoj ne ĝenante la literaturistojn, farus ja grandegan servon al nia kara afero. Prof. E. Grosjean-Maupin.

## Pri neologismoj.

Neniu estas devigata esti esperantisto, sed kiam oni aspiras al tiu honoro, oni nepre devas sin submeti al certa disciplino. Ĉe la naciaj lingvoj tiu disciplino estas severe altrudata de la longa tradicio, dum ke ĉe ni, esperantistoj, la tradicio apenaŭ ekzistas; konsekvence, ni devas ĝin anstataŭigi per alia leĝo, nome per la libervola obo al nia Fundamento. „Ĉiu vera amiko de la lingvo internacia“, diris Zamenhof, „devas silenti pri siaj personaj gustoj; nun kiam ni estas ankoraŭ tro malfortaj, ni povas atingi nian celon nur per severa disciplino kaj per absoluta unueco.“

La Fundamento, tion ni scias, konsistas simple el ia gramatika epitomo kaj el tre malampleksa vortaro; al ĝi oni povas doni aldonojn en okazo de nepre bezono, sed ĝi mem estas absolute nemodifebla. Ĝi estas, laŭ la esprimo de s-ro Kalocsay, kvazaŭ la trunko de la lingvo, la minimumo, kiun ĉiu komencanto devas lerni, kiun ĉiu elementa esperantisto devas posedi; kaj tial, por la komuna, ĉiutaga lingvo, la **Oficiala Klasika Libro**, kolekto de la Akademio, de s-ro Grosjean-Maupin, plene sufiĉas. Ja ĉe pluraj vortoj, kiel ŝmaco, buduaro, sakro, rekremento, barĉo, pirozo, ne ŝajnas al mi tre necesaj.

Multaj malamikoj niaj asertas, ke tia netuŝebla Fundamento stagnigas la lingvon, baras la vojon al la poezio kaj malhelpas la evoluon entute. Ha! granda Dio! Kia malvero! Al tiuj kontraŭuloj ni montru nur per kelkaj ekzemploj, kiom forte jam progresis nia lingvo de post Zamenhof. Antaŭ 30 jaroj, oni almitis, subaĉetis, libertempis, ŝaceligiĝis, elrigardis; nun oni konkeras, korpuras, ferias, hezitas, aspektas; oni plie angoras, amoras, kontestas, stumblas, teroras, svarmas, testas, kaŭras, blagas, sensas. En la komenco oni ne konis la vortojn abunda, vito, animalo, planto, sekura, emerita, surto, hirta, polekso, farso kaj multajn aliajn. Tiam ĉiuj bestoj egale kaj same blekis, dum ke hodiaŭ la ĉevalo henas, la bovo muĝas, la hundo bojas, la kato miaŭas, la porko gruntas, la lupulo hurlas, la muso kvikas, la korvo grakas, la pasero pepas, kaj la kolombo kveras.

Ankaŭ interne de la lingvo ni konstatas multe da novaĵoj; jen duoblaj prepozicioj: de sur la monto, el sub la lito, ŝi venas de ĉe la onklino, de antaŭ, de post, de per, ekde; jen novaj adverboj: fore, ene, pere, ele, sure; novaj parolturnoj: akcepto al la kongresanoj per la urbestro, ekspluato al la laboristoj fare de la kapitalistoj; novaj korelativaj vortoj: multiu, multiam, kelkio, ke!kiu, kelkie; aliam, alie, alu, aliel, kaj ankaŭ novaj afiksoj: mis, end, fi, ism, iv, oz, iz. Krom tio niaj poetoj volonte kunfandas la substantivon kun ĝia adjektivo: grand-arbo,

Kar-dio, bel-knabino, glat-haroj, tut-arbaro kaj ĉe ili oni ofte trovas esprimojn kiel: okule manĝi, kartaŭguri, skandalaj iun, sabri la malamikojn, li ne fortas paroli, jam tempo foriri, la arbaro verdas, la maro bluas, k. s.

Mi devas ankaŭ noti: 1-e, la daŭran klopon por forigi la malprecizan prepozicion je, kiun Zamenhof tute ne uzis en siaj lastaj verkoj; en la Proverbaro, ekzemple, oni ne trovas unu solan je; oni ĝin rezervas preskaŭ ekskluzive por la tempo, kaj por la loko: je la oka horo; la vilaĝo troviĝas je kvin kilometroj for de la urbo; 2-e, la klopon por eviti la kunmetitajn formojn de la verbo; ekzemple, anstataŭ: Kion vi estas faranta? La letero, kiun mi estis skribonta; hieraŭ se la kuracisto ne tuj estus veninta; oni preferas diri: Kion vi nun faras? La letero, kiun mi devis aŭ volis skribi; hieraŭ se la kuracisto ne tuj venus; kaj 3-e, la penadon por redukti iomete la tro grandan nombron de niaj malvortoj: amara, alifliti, aŭdaca, vakua, stulta, rara, milda, estas jam tre bonvenaj; sed aliaj, proponataj de reformistoj, apertaj, cisa (maltransa) men (malpli), mej (malplej), trista, poka (malmulte) infra, kurta, tarde ankoraŭ ne estas akceptataj.

El la rimarkoj ĉi supre ni vidas ja, ke Esperanto tute ne stagnas; en malo, ĝi evoluas rapide, preskaŭ tro rapide. Kompreneble, el tiom da novaj esprimoj ne ĉiuj estas aprobindaj, kaj, krom Zamenhof, ni imitu nur la plej bonajn verkistojn, kies stilo estas samtempe harmonia, simpla kaj klara. Cetero, kiu en okazo de dubo bezonas ian gvidanton, tiu konsultu nur la Plenan Vortaron de Profeso Grosjean-Maupin, aŭ la **Wiŝter'an Enciklopedian Vortaron**, du tre gravajn verkojn fidindajn. H. Boucon.

## Pri la prepozicio „de“.

Kelkaj esperantistoj jam de longe plendas pri uzo je la prepozicio de laŭ pluraj sencoj, kio efektive kaŭzas konfuzon en kelkaj okazoj.

Ili estas pravaj, sed tio devenas ne de manko en la „Fundamento“, sed de misuzo je la prepozicio de, de la esperantistoj mem — kaj sekve estus facile forigi tiun ĝenon, ne enkondukante pluan prepozicion, kiel oni kelkfoje proponis fari. Ni provos montri tion en tiu mallonga noto.

En la „Fundamento“ oni legas: de = de / of, from / von; ersetzt auch den Genitiv!

Tio montras ke de estas esprimo de genitivo; nu, etimologie genitivo montras produkton, devenon (latine g'gnere); aliparte, en „Ekzerco“ ĝi estas ĉiam uzata laŭ tiu difino. Ankaŭ, en „Respondoj“, publikigitaj de „la Revuo“ (1906—1909), D-ro Zamenhof diras: „... la prepozicio de ĉiam montras nur la aganton... uzi simplan prepozicion de en iu alia senco ni devas ĉiam eviti...“

Resume de montras originon, se temas pri spaco aŭ tempo; metafore kaŭzon, sekve aganton, se temas pri agado; fine posedanton, ĉar posedo estas ago. Tie ĉi ne estas kvar sencoj, sed unu nura kaj tre preciza, ĉar tiuj kvar ŝajne diversaj sencoj esprimas la saman ideon: originon.

Inter la nepravaj uzoj je de, la plej komuna estas tiu, kiun montras la agaton (ekz.: mortigo de homo, preparo de la kongreso, komunikado de via letero). Ĝis nun oni tre malofte trovas uzon je je aŭ je akuzativo en tiaj formoj, kaj D-ro Zamenhof mem preskaŭ ĉiam uzas de. En la plej bonaj vortaroj oni ankaŭ trovas tiun uzon; s-ro Grosjean-Maupin, en „Plena Vortaro“, aldonas nur kelkajn vortojn por konsili anstataŭon je de per prepozicia esprimo (fare



de, de la flanko de), je, aŭ akuzativo, aŭ al, sed nur kiam oni povas timi konfuzon en frazo, kie temas samtempe pri aganto kaj agato — dum tiu anstataŭo estas konsilinda, kiel laŭfundamenta, kiam temas nur pri agato; ĉar ekzemple en: akcepto de la kongresanoj, oni ne scias, ĉu la kongresanoj akceptas aŭ estas akceptataj.

Tiu malbona uzo, kiu fariĝas esperantismo (laŭ esprimo de D-ro Zamenhof mem), estas kaŭzita de malatento de la esperantistoj: verdire estas necese atenti por trovi ĉu substantivo devenas de verbo, en kelkaj okazoj, se ĝi ne havas la finojn **ado** aŭ **igo**. Eble ankaŭ kaŭzas tiun eraron ekzistado de simila formo en kelkaj naciaj lingvoj, ekzemple la franca lingvo; en franca lingvo de estas uzata kiel prepozicio multisenca analoga al je; kaj tio ne estas grava, ĉar ekzistas prepozicio **par**, por montri aganton.

D-ro Zamenhof mem ne ĉiam uzis de laŭ tiu nediskutebla fundamenta sencu, ekzemple en tiu frazo de la Fundamento (Ekzerco § 32): „**Glaso de vino** estas glaso en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiu oni uzis por vino; **glaso da vino** estas glaso plena je vino.“ Nu, se oni uzus de laŭ fundamenta difino, oni devus diri: „**Glaso por vino** estas glaso, kiu oni uzas por vino; **glaso de vino** estas glaso plena je vino, ĉar ĝi estas plenigita de vino (vino estas aganto); **glaso da vino** estas la kvanto da vino entenata en glaso plena de vino.“ Ekzemple oni diros: „tiu homo trinkis kvar glasojn da vino; estas sur la tablo glasoj de blanka vino kaj glasoj por ruĝa vino.“

Ciukaze se oni volas enkonduki pluan prepozicion, ĝi devus montri la aganton kaj ne la aganton, kiun de montras laŭfundamente. Tamen oni ĝis nun ĉiam proponis anstataŭigi de per alia nova prepozicio por montri la aganton — aŭ la posedon —; verŝajne D-ro Zamenhof tion ne faris pro la relative malofta uzo, kiun ĝi havas, por ne pligrandigi nombron de prepozicioj kun preskaŭ simila signifo (**de, da**), inter kiuj estas jam kelkfoje malfacile elekti — kaj por ne krei prepozicion, kiu havas la fundamentan sencu de **de**.

El la supramontrita klarigo rezultas ke, por forigi la dubsecon de la prepozicio **de**, oni devas uzi ĝin nur laŭ la fundamenta sencu; en alia okazo oni povas uzi kvar formojn: 1-e prepozicion je; 2-e akuzativo; 3-e adjektivo; 4-e kunmetitan vorton.

Jen kelkaj ekzemploj, kiuj montras aplikadon je tiuj principoj; ili estas elektitaj inter tiuj donitaj de s-ro Grosjean-Maupin en „Plena Vortaro“.

#### Laŭfundamenta uzo:

**Komenco, origino:** foriri de iu loko; de mateno ĝis vespero.  
**Kaŭzo:** tremi de febro.

**Aganto:** branĉo rompiĝis de la vento.

**Posedanto:** de kiu estas tiu libro?

kanto de la birdoj.

#### Kontraŭfundamenta uzo kaj anstataŭa formo:

**Prepozicio je:** peco de tiu tuko (peco je tiu tuko); mortigo de homo (mortigo je homo).

**Akuzativo:** akcepto de kongresanoj (akcepto kongresanojn); prezentado de Hamleto (prezentado Hamleton).

**Adjektivo:** ĉevalo de blanka koloro (blankokolora ĉevalo); brutoj de sama speco (samspecaj brutoj).

**Kunmetita vorto:** vendisto de vino (vinvendo);  
Roiŭet de l'Isle.

## LINGVA TRIBUNO

### Scipovi.

(Ril. al Lingva Kritiko p. 2.)

La esprimo „scipovi“ ne estas logike uzata. Se iu diras „mi scipovas lingvon“, li ordinare opinias: „mi scias kaj ankaŭ povas uzi lingvon“. El la tri radikoj **sci**, **pov** kaj **uz** oni arbitre elektas du — kaj malĝuste kombinas ilin.

Ni havas skriban metodon, por esprimi la signifon „kaj ankaŭ“: la „ligstreketon“. Ekz. poeto-komponisto signifas: poeto kaj ankaŭ komponisto (rig. mian germanlingvan instru-libron Esperanto-Führer p. 36). Laŭ tiu metodo la frazo „mi scias kaj ankaŭ povas uzi lingvon“ ricevas la formon „mi scias-uz-povas lingvon“. — Sed la scio de lingvo necese apartenas al la uzo. Laŭ la „principo de sufiĉo“ oni do nur diros: „mi uzpovas lingvon“ aŭ pli science „mi uzkapblas lingvon“. Diferenco: mi povas morti je galŝtonetoj, sed mi ne kapblas morti je galŝtonetoj, ĉar tio estas ekster miaj kapabloj.

Jam antaŭ dek jaroj mi proponis, ekzamenj la demandon, ĉu estas rekomendinde, enkonduki unu aŭ la alian el la sekvantaj afiksoj:

**red-** = reciproke. Ekz. redbati (memorhelpilo: redone bati, tien kaj redirekte bati) = bati ĉiu la alian. La uzo de „inter“ por tiu signifo ne estas tute logika. Mi intervenas, se mi venas inter du personoj. Mi interbatas, se mi batas inter du personoj, por disigi ilin. Krome prefiksoj estu unusilabaj!

**-onc** = kiu kapblas<sup>1</sup>). Ekz. dispononca persono (jura esprimo) = persono, kiu kapblas disponi (memorhelpilo: dispononta persono, persono kun disponont-kapaco [?]). Do uzoncoj lingvon = uzkapabli lingvon, „regi“ lingvon.

**-ev** = kiu devas<sup>2</sup>). Ekz. respondeva redaktoro (kiu devas respondi je demandoj de l' registaro pri la enhavo); ĉiuj homoj estas mortevaj (germane: sterblich).

**-if** = diri ion tia, deklari ion tia. Ekz. verifi = deklari ion vera; kulpifi = deklari ion kulpita. La ofte uzita esprimo „kulpigi“ por tiu signifo estas mallogika. La vera signifo de kulpigi estas simila al forlogi al malbona faro.

Kion signifas „scipovi“? Ke mi ne scias ion, sed povas scii ĝin, se mi volas. Mi ne scias la naskiĝtagon de pentristo, sed mi povas scii ĝin, legante en leksikono, kiu staras sur mia tablo. Mi do scipovas ĝin. Sed la uzantoj de „scipovi“ opinias ion alian.

La malĝusta uzo de „kulpigi“ (anstataŭ kulpdeklari) rememorigas al mi alian mallogikan uzon de „ig“, la vorton „diferencigi“, kiu signifas: krei diferencon. Ekz. post naskiĝo de ĝemeloj oni diferencigas ilin, donante al ili haŭtsignojn. Sed io alia estas la signifo: rigardi diferencaj, deklari diferencaj; por tiuj signifoj oni ne uzu la vorton diferencigi. Ekz. Ido diris, ke la mondlingvaj radikoj ne havas karakteron de vortspeco (substantivo, verbo ktp.). Mi mem scias, ke ekzistas tiu diferenco, mi rigardas la radikojn diferencaj. Tio estas metodo de la rigardo, kiu disigas; mi do disrigardas

<sup>1</sup>) Komparu la germanajn esprimojn: aufnahmefähig, brauchsfähig, widerstandsfähig — arbeitsfähig, erwerbsfähig, dienstfähig — zahlungsfähig, steuerfähig — zeugungsfähig, bündnisfähig, verbesserungsfähig, leitfähig (elektrisch) — wehrfähig, felddienstfähig, garnisdienstfähig, ktp.

<sup>2</sup>) Komparu la germanajn vortojn: aufnahmepflichtig, arbeitspflichtig, dienstpflichtig, steuerpflichtig — gebührenpflichtig, ersatzpflichtig, versicherungspflichtig, anmeldepflichtig — wehrpflichtig, militärpflichtig, ktp.

radikojn substantivajn, verbajn ktp. Mi ankaŭ deklaras ilin diferencaj (diferencias ilin).  
G. Schattat.

Ni escepte publikigas la proponojn de s-ro G. Schattat, kvankam ni ne trovas ilin aprobindaj.

**Scipovi** estas „adicia“ kunmetaĵo, kreita de Zamenhof por traduki la germanan vorton **können**, kiam ĝi signifas kion la romanikaj lingvoj indikas anstataŭe per vortoj signifantaj „scii“. D-ro Zamenhof eble intencis superponigi la fosaĵon dividantan la du lingvogrupojn.

Aliflanke, ĉe kunmetitaj aŭ derivitaj vortoj ne estas eble esprimi plene la rilatojn ekzistantajn inter la diversaj elementoj. Evidente, **vaporŝipo** estas tiel same nelogika, kiel **scipovi**: oni devus logike diri **vapor-movataŝipo** aŭ ion similan. Cetere, oni ne devas konsideri vorton, disigante ĝin de la kunteksto, ĉar izolita vorto tre malmulte signifas.

Ni estas principe kontraŭuloj de novaj afiksoj: ili multe plimalfaciligas lingvon, kaj precipe lingvon artefaritan, kie la uzo de la nova afikso fariĝas deviga, kaj tial oftege embarasiga aŭ tropeza. Oni memoru nur pri la **logikoza** Ido!

Fine, sed ne malplej grave, oni ne devas malatenti la ĝeneralan uzon de la ĉefaj eŭropaj lingvoj: internacia lingvo devas nepre esti pli facila, kaj ne pli malfacila, ol la naturaj; tial oni devas zorgi eviti la enkondukon de afiksoj, kiuj havas nenian ekzemplon en la ĉefaj naturaj lingvoj.

Nu, kion oni povas konstati ĉe ekzameno de la afiksoj proponitaj de s-ro Schattat? Ke eĉ en la germana lingvo, eble la plej riĉa je afiksoj, la konceptojn indikitajn de s-ro Schattat oni montras per kunmetaĵo.

Efektive fähig estas memstara adjektivo, kiu signifas „kapabla“, kaj kiun oni tra bone tradukas en Esperanto per **pova** („disponpova“ persono), kaj **pflichtig** signifas „devigata“ kaj en Esperanto oni povas uzi ĉe kunmetaĵo **deva** („mortodeva“, „respondedeva“). La vortoj estas iom pezaj, sed ne pli ol la korespondantaj germanaj. Same oni povas fari pri la du aliaj afiksoj. S. L. C.

### Etjo.

En sia valora verketo D-ro Privat priparolas ankaŭ la kares-sufiksojn ĉi kaj ĉi kaj akcentas, ke la neslavaj popoloj nur malfacile kutimos al tiuj esprimoj. Nur paĉjo kaj panjo estas jam etiketaj vortoj. Sed ni bezonas ofte ankaŭ sentesprimojn por la prikskribemaj lingvoj. Al la novaj vortoj kun la sufiksoj ĉi kaj ĉi mankas pro la ŝtumpigitaj radikoj la komprenebleco: Ekz. kiu komprenas tuj la esprimojn **birĉjo**, **kaĉjo**, **fraĉjo**, **franjjo**? Kiu volonte kaj flue parolas la vorton **avĉjo**? Eble slavoj, sed certe ne ĉiuj aliaj esperantistoj. Tamen ni bezonas kares-vortojn. Kiel helpi? La proponita uzado de la sufikso **et** ne sufiĉas, ĝi povas ankaŭ kaŭzi logikajn erarojn. Kateto estas malgranda kato, sed tute ne ĉiam karesota kato. Kiel esprimrimedo por kareso plaĉas al mi la sufikso „**etj**“. La vortoj **patreĉjo**, **fratineĉjo**, **hundetĉjo**, **avineĉjo** ktp. estas senplue kompreneblaj kaj uzadeblaj por ĉiuj esperantistoj. — Kion opinias pri tio la lingvistoj de la diversaj landoj?

E. Klemm.

### Bonvolu korekti:

En „Lingva Kritiko“ n-ro 2, „Lingva Tribuno“, p. 4, kol. 3, linio 18, anstataŭ „pensanta“ legu „pensata“ (kumpensata).